



Opero en kvar aktoj


muziko de S.MONIUSZKO

teksto de W.WOLSKI

el la pola lingvo esperantigis

ANTONI GRABOWSKI

Pola Esperanto Asocio



HALKA

Opero en kvar aktoj

Muziko de S. MONIUSZKO — Teksto de W. WOLSKI

EL LA LINGVO POLA ESPERANTIGIS

ANTONI GRABOWSKI

Pola Esperanto-Asocio

Varsovio, 1987

b. esperanto

Kovrilprojektintoj: E. Z. Kasprzyk



92.2

821.162.1-2 = 922

ENKONDUKO

La esperantlingva enscenigo de la konata pola opero "Halka" en 1912 fariĝis elstara evento en la historio de la E-movado. Ĝi estis la unua opero, kiun oni enscenigis - cetere tre sukcese - en la internacia lingvo Esperanto kaj tuj klare evidentiĝis, ke la lingvo trovis plian kampon de la aplikeblo, kio por la prestiĝo de Esperanto havis grandegan signifon. Ĉi tiun epokfaran tradukon efektivigis la plej eminenta poeto de la pionira periodo de E-o Antoni Grabowski, kiu unue tradukis kaj publikigis unuopajn ariojn de "Halka" kaj poste - por omaĝi la 25-jariĝon de Esperanto kaj elstarigi la unuan sur la pollanda tero universalan kongreson en 1912 en Krakovo - tradukis la tutan oper-tekston. La plena teksto de la traduko de la libreto aperis libroforme en 1912 kun ampleksa antaŭparolo de Grabowski mem pri la komponinto de la opero, Stanisław Moniuszko kaj pri la aŭtoro de la libreto - Włodzimierz Wolski. Okaze de la pasonta en la 1937 jaro 75-a datreveno de la esperantlingva enscenigo de "Halka" Pola Esperanto-Asocio decidis reeldoni la tutan tekston en la JUBILEA LIBRO-SERIO, en kiu pli frue jam aperis "Historio de Esperanto" de A. Zakrzewski kaj "LA UNUA LIBRO" de L.L. Zamenhof. Por proksimigi al la nuntempuloj la vivon kaj literaturan laboron de la tradukinto de la libreto, Antoni Grabowski, oni decidis dediĉi al li specialan atenton en la nuna enkonduko.

*

Antoni Grabowski naskiĝis la 11-an de junio 1857 en Nowodobre apud Chelmo, kiel filo de Franciszek kaj Antonina el Suminski-familio. Baldaŭ post la naskiĝo de Antoni la tuta familio translokiĝis en Toruń. La vivrimedoj de la familio ne estis sufiĉaj kaj sekve de tio Grabowski, fininte la lernadon en la lasta klaso de la elementa lernejo, kiel dekelkjara knabo, jam komencis labori. Tamen lia emo lerni estis grandega kaj sen kies ajn helpo li preparis sin al la enkonduka gimnazia ekzameno. La ekzamenon li trapasis eminente kaj jam poste dum la

lernado du fojojn oni translokigis lin en pli altan klason pro la bonegaj lerno-rezultoj kaj scioriĉo, per kiuj li superis siajn samaĝulojn. La 16-an de septembro de la 1879-a jaro li finis la lernadon en la Gimnazio je la nomo de Mikolaj Kopernik, kiu cetere ĝis nun ekzistas en Toruno.

Intertempe pliboniĝis la vivrimedoj de la familio, kio ebligis al li la pluan lernadon. Li forveturis al Vroclavo, kie en tiea Universitato li komencis studi filozofion kaj natursciencojn. La studadon li finis tre sukcese en 1882 kaj li fariĝis inĝeniero pri kemio. Unue li laboris en Zawiercie kaj poste en kelkaj lokoj sur la tereno de la nuna Ĉeĥoslovakio kaj fine li fariĝis specialisto pri kemia kolorigado de ŝtofoj. Verŝajne en 1887, laŭ la pola "Biografia Vortaro" li forveturis al Rusujo al la industria urbo Iwanowo-Wozniesiensk, kie en la teksindustria fabriko de Pafuszyn kaj Derbieniew li okupis unu el la estraj postenoj. Grabowski disvilvis tie sian kemian talenton, li faris kelkajn inventaĵojn pri la kolorigado de ŝtofoj, eĉ por unu el ili li ricevis patenton en Germanujo, kaj ĝenerale li kontribuis al la plibonigo de la kvalito de la produktaĵoj de tiu fabriko.

En la 1898-a jaro Grabowski revenis al la hejmlando kaj en la 1904-a jaro li porkonstante ekloĝis en Varsovio. Intertempe lia nomo fariĝis pli kaj pli konata en la medio de kemiistoj, i.a. pro liaj artikoloj en la revuo "Chemik Polski" (Pola Kemiisto), pro la traduko de la verko "Leciono pri kemio" de Ira Remsen (1907), kiun taskon li efektivigis kune kun Wincenty Humnicki.

Tamen tute speciale Grabowski meritiĝis en la sfero de kemia terminologio. Li prezentis la iniciaton pri la unuecigo de la kemia terminologio kaj siajn ideojn li publikigis en la artikolo "Pri nia kemia terminologio" (la revuo "Wszecħswiat", 1900, n-ro 13). La ideoj de Grabowski elvokis grandan interesiĝon de fakuloj, pridiskutis ilin ankaŭ lingvistoj kaj sekve Bronislaw Znatowicz prezentis ilin dum la IX Kongreso de Kuracistoj kaj Natursciencistoj en 1900 en Krakovo. Kiam en la 1919-a jaro oni fondis la Polan Kemiistan Societon, Grabowski

apartenis al la kunfondintoj kaj aliĝis al la vortara komisiono. Multajn fakajn terminojn proponitajn de Grabowski oni oficoale akceptis kaj per tio li konsiderinde kontribuis al la stabiliĝo de la pola kemia terminaro. Ni aldonu, ke en 1906 aperis lia "Kemia Vortaro" (por poloj).

*

Ankoraŭ en la periodo de la universitataj studoj en Vroclavo Grabowski apartenis en la jaroj 1879 kaj 1880 al Towarzystwo Literacko-Słowiańskie (Literatura-Slava Societo). Kaj verŝajne tiam ne nur profundiĝis lia pasio al literaturo, sed ankaŭ aperis interesiĝo pri la ideo de lingvo internacia, kion certe influis la vasta interesiĝo pri fremdaj lingvoj. Ĉi-loke ni aldonu, ke li parolis 9 lingvojn kaj ĉirkaŭ 15-18 lingvojn li konis pasive. En 1885 li ellernis Volapük kaj ekligis personan kontakton kun la kreinto de ĉi tiu planlingvo, Martin Schleyer. "Kvankam mi havis sufiĉan kapablon por lingvoj - rememoris Grabowski en 1909 - mi baldaŭ konvinkiĝis, ke ne estas facile fariĝi lerta volapükisto. La sinjoroj redaktoroj sciis skribi volapüke, ne formetante la vortaron el la manoj, sed ili ne sciis paroli la tro malfacilan lingvon. La ĉefa kaŭzo de ĝia pereco estis do ne la apero de Esperanto, sed la cirkonstanco, ke Volapük neniam fariĝis kaj ne povis fariĝi lingvo viva, flue parolata". La seniluziiĝo de Grabowski pri Volapük estis tiel granda, ke li ĉesis okupiĝi pri ĝi, sed li tamen rezignis entute pri la ideo de lingvo internacia.

La jaro 1887 fariĝis epokfara en la vivo de Grabowski, kion li rememoras jene:

"En somero de 1^a jaro 1887, veninte el Norda Bohe-mujo, mi vizitis miajn parencojn en Prusujo kaj tiam en Toruna pola librejo oni montris al mi la ĵus aperintan unuan lernolibron de D-ro Esperanto. Mi aĉetis ĝin, kaj reveninte hejmen, tuj komencis ĝin studi kaj estis ravita de la simpleco, logikeco kaj bonsoneco de la nova lingvo. Post kelkfoja traleĝo de la 3 versaĵoj "Mi penso", "El Heine" kaj "Ho, mia kor", mi sciis ilin deklami parkere kaj sentis, ke mi fariĝis fervora ano de la "lingvo internacia" (mi ne diras Esperantisto, ĉar tiu vorto tiam

ankoraŭ ne ekzistis). Post kelkfoja tralego de la 16 fundamentaj reguloj kaj de la 200 radikoj, kiujn mi konis el aliaj lingvoj, mi sciis la tutan lingvon kaj mi skribis jam en la lingvo internacia, sub adreso de D-ro L. Zamenhof al D-ro Esperanto, leteron, en kiu mi gratulis la aŭtoron, esprimis mian profundan kredon je la venko de lia verko, kaj aniĝante "senkondiĉe" promesis kunlabori en la disvastigado de la mirinde bela kaj facila lingvo. Mi ricevis baldaŭ gentilan respondon de la aŭtoro, kiu konfesis al mi sian veran nomon, kaj de nun komenciĝis mia viva korespondado kun la Majstro, kiu ĝojigadis min per adresoj de la unuaj diverslandaj adeptoj de la "lingvo internacia".

La koresponda kontakto kun Zamenhof fariĝis pli kaj pli proksima kaj fine venis alia historia momento, kiun Grabowski en 1909 rememoris jene:

"Ĝoja estis ankaŭ kaj neforgesebla por mi la tago, kiam en 1838, veninte Varsojon, mi vizitis mian Majstron. Tiam, kiel al mi memorigas D-ro Ludwik Zamenhof, inter ni ambaŭ eksonis la plej unua interparolado esperanta. Ambaŭ ni parolis la lingvon la unuan fojon kaj tamen la lingvo ekfluis vige, ĉar ĝi estis jam antaŭe viva en niaj koroj kaj mensoj".

Pro la jam menciita amo al literaturo Grabowski tuj alpaŝis al ĉi-kampa agado, kredante, ke ĝuste literaturo povas vivigi la planlingvon de Zamenhof. Jam en la 1838-a jaro aperis lia traduko de "La neĝa blovado" de A. Puŝkin, kiu estis la unua literatura verko en la historio de nia movado aperigita libroforme (la eldonkostojn pagis L. Zamenhof mem), ne kalkulante la literaturajn specimenojn de L. Zamenhof, kiuj enestis en la "UNUA LIBRO". Unu jaron pli poste (1839) aperis lia traduko de "La gefratoj" de J. W. Goethe.

Tiutempe Grabowski trafe konkludas, ke la adeptoj de la nova lingvo internacia urĝe bezonas modelojn de ĉiutagaj frazoj kaj esprimoj kaj modelojn de leteroj. Li senhezite prenis sur sin la taskon ellabori tiajn modelojn. La materialo aperis libroforme en la 1870 jaro sub la titolo "Kondukanto internacia de l' interparolado" kaj

ekde la apero ĝi komencis ludi gravan unuecigan rolon en la lingvouzo, en la tempo, kiam bazo de la lingvo ankoraŭ ne estis elformiĝinta kaj mankis tradicioj de parola lingvouzo.

*

En la jaroj 1890-1905 Grabowski dedecis sian tempon parte al kemio, parte al Esperanto. Li kunlaboris kun la revuo "La Esperantisto" (1889-1895) kaj disvolvis kontaktojn kun la unua nelegala pola esperantista organizaĵo, kiu ekzistis en Varsovio en la jaroj 1891-1893. Tamen tiutempe en la lingvo Esperanto ne ĉio plaĉis al Grabowski. Li sentis ioman seniluziigon pro la nekontentiga evoluo de la praktika uzado de la lingvo kaj pro la fakto, ĝi ne tuj sukcesis konkeri la mondon. Li kredis, ke i.a. ĉi tion kaŭzis la neperfekteco de la lingvo. En la periodo de la reformema ondo kaj krizo en la tiam esperantista movado (1894), influante i.a. de interlingvisto E. de Wahl, li iom deflankiĝis de Esperanto. En 1896 Grabowski ekligis kontakton kun internacia studgrupo gvidata de prof. L. Wahren (Hanovro). En la revuo de ĉi tiu grupo "Linguist" Grabowski aperigis siajn studojn pri la demando de lingvo internacia, en kiuj iom-post iom li venis al la ideo pri la sistemo bazita sur la franca lingvo. Sed fine li ekkonsciis la vanecon de ĉi tiu ideo kaj pli poste li rezignis pri reformado, kaj en la parolado farita kadre de la Bulonja kongreso en 1905 li esprimis sian kredon pri netuŝebla lingvobazo.

*

En 1904 Grabowski fariĝis prezidanto de la Varsovia Societo Esperantista, kiu unue funkciis kiel filio de la Peterburga Societo "Espero" kaj en 1908 transformiĝis en memstaran Polan E-Societon kun la rajto fondi filiojn en diversaj urboj. Grabowski ne nur bone gvidis la estraran laboron, kion plene konfirmas la konserviĝintaj dokumentoj, sed ankaŭ lerte propagandis la lingvon per prelegoj, artikoloj, informaj lecionoj, li eĉ mem gvidis multajn kursojn. La nuntempajn pedagogojn povas surprizi la trafa artikolo de Grabowski pri la propedeutika valoro de

de Esperanto por aperigita en "Pola Esperantisto" en 1908. Grabowski substrekis en ĝi, laŭ siaj propraj spertoj, ke la instruado de E-o en lernejoj "influas la spiritan disvolviĝon de la lernanto" kaj, kio tiutempe por multaj homoj estis tute nekomprenebla kaj eĉ nekredebla, "ĝi helpas la lernadon de aliaj lingvoj". Grabowski elmontris sekve per konkretaj ekzemploj, kiagiade E-o helpas al junaj homoj en la lernado de la franca kaj latina lingvoj kaj konkludis, ke "Esperanto devas fariĝi la nepre neceso propedeutiko de lingvoj".

La aŭtoritateco de Grabowski en internacia E-movado kreskis. En 1905 li estis sekretario de la I-a Kongreso en Bulonjo-sur-ĉiĉaro, li eniris la fonditan tiam Lingvan Komitaton, sekve, en 1908 li fariĝis membro de la Akademio de Esperanto kaj direktoro de ĝia Gramatika Sekcio. Jen kaj jen aperis liaj novaj tradukoj, i.a. "En Svisujo" de J.Słowacki (1904), "La patro de pestuloj" de J.Słowacki (1905), "Consilium facultatis" de A. Fredro (1909), "Nova Antologio" (poemoj originalaj kaj tradukitaj, 1909), "Mazepa" de J.Słowacki (1912), "Pekoj de I' infaneco" de B.Prus (1913), "Ŝi, la tria" de H.Sienkiewicz (1913) kaj fine du plej gravaj verkoj "El parnaso de popoloj", poemoj tradukitaj el 30 lingvoj (1913) kaj "Sinjoro Tadeo" de A.Mickiewicz (1918). Liaj "Granda vortaro pola-esperanta kaj "Granda vortaro esperanta-pola" (1910) fariĝis grava leksikologia bazo, kiun ĝis hodiaŭ prenas en konsideron la aŭtoroj de ĉiuj plej gravaj E-vortaroj.

*

Kiam eksplodis la unua mondmilito Grabowski kelkan tempon pasigis en Toruno kaj Bydgoszcz kaj en 1915 li revenis Varsovion. Estante soleca en sia hejmo li komencis traduki la tutan epopeon "Sinjoro Tadeo" de A.Mickiewicz, al kio jam delonge instigis lin L. Zamenhof. En aŭgusto 1916, farinte konsiderindan parton de la traduko, kune kun alia E-poeto Stanisław Karolczyk li vizitis Doktoron Zamenhof. "post la fino de legado - rememoris tiun viziton en "Pola Esperantisto" Karolczyk - Zamenhof per manpremo gratulis al Grabowski la bonegan tradukon kaj esprimis la deziron, ke "Sinjoro Tadeo" nepre

devas esti tute esperantigita. Farinte jam tiel bonan komencon - diris Zamenhof - vi estas destinita alkonduki ĝin al la fino". Kaj efektive en la 1918 jaro "Sinjoro Tadeo" aperis libroforme. La tradukinto ĝisvivis ĉi tiun momenton. La 4-an de julio 1921 li subite mortis surstrate pro korinfarkto. Li postlasis hejme plenmanon da pliaj tradukoj, kiujn ankoraŭ en 1921 oni eldonis en broŝuro titolita "Postrikolto".

La traduko de "Sinjoro Tadeo" montriĝis unu el la plej elstaraj. Enrico Dondi en "la Nica Literatura Revuo" en 1956 nomis ĝin "superba monumento de la esperanta traduka poezio". D-ro Kolomano Kalocsay konstatis, ke ĝi "ĝerme enhavas eble ĉion, kion povas elserĉi el la lingvo". Paulo Balkany en 1921 en sia postmorta prelego pri Grabowski parolante pri "Sinjoro Tadeo" diris: "la ebleco ĝui verkon de malgranda popolo por ĉiuj nacioj, kaj ĝui ĝin kvazaŭ la originalon mem, estas tia sukceso de nia lingvo kaj tia pruvo de la talento de Grabowski, ke sola ĉi tiu verko sufiĉus por konservi lian memoron en nia literaturo". Reto Rosetti recenzante la reeldonon de "Sinjoro Tadeo" skribis, ke ĝi "absorbis la leganton per sia movo kaj koloro, kaj kiu poste restas riĉa fonto de epika kaj poezia travivaĵo, kiun oni volonte kaj ofte refolios. Se mi pripensas, ke nur per Esperanto mi povas konigi kun tiu grandverko de la mondliteraturo - ĉar la ŝajne sola angla traduko estas farita per pretaj paraĝrafoj - mi sentas profundan dankon kaj fieron pri nia superba lingvo ..." Tamen plej karakteriza estas la opinio pri la epopeo de Kalocsay el 1931, ke "ĝi devus esti pri-traktita en ĉiu supera kurso, studata de ĉiu poemtradukisto. En ĉi tiu verko triumfas vere tiu kuraĝa kaj eleganta formo de stilo, kiun oni komparis al al impresionisma pentromaniero."

*

Kiel vi povis orientiĝi la meritoj de Antoni Grabowski por la E-literaturo kaj evoluigo de la lingvo estas grandegaj. Por ĝuste taksi ilin, oni devas tamen koni liajn verkojn. Tial do oni povas esperi, ke la nuna reeldono de "Halka" bone kontribuos al tio.

ANDRZEJ PETTYN

Faint, illegible text, possibly bleed-through from the reverse side of the page. The text is too light to transcribe accurately.

ANTAŬPAROLO

STANISLAW MONIUSZKO (Stanislav Monjuŝko), unu el plej geniaj polaj muzik-komponistoj, reforminto de la pola opero, naskiĝis en la jaro 1819, en la gepatra bieno Ubiel (Minska gubernio).

Lia patro, viro humaniste instruita kaj talenta, estis estiminda civitano kaj brava militisto, batalinta por la libereco de Polujo, — lia patrino estis virino klera, sciis tre bone ludi fortepianon kaj kanti, kaj ŝi zorgeme flegis la ĝermojn de l' talento, kiu vekigis en M. tre frue.

Ricevinte de la naturo delikatan muzikan aŭdosenton, Moniuszko jam kiel infaneto memoris bone la melodion de ĉiu aŭdita kanteto kaj ripetis ĝin tre facile per sia voĉeto. Li avido aŭskultis la muzikon de vilaĝanoj, same kiel popolajn kantojn, fabelojn kaj legendojn, kaj li partoprenis en la superstiĉaj popolaj ceremonioj kaj festoj de sia hejmlando. — Ĉio ĉi potence impresis lian fantazion kaj imagecon kaj tie estis la fonto, el kiu li estis ĉerponta la riĉecon de ritmoj, karakterizantaj lian muzikon, — el tie fluas ankaŭ la meditemo de melodioj en liaj muzikbildoj, rekreantaj la popolajn ceremoniojn.

En la jaro 1827 la knabo estis sendita en Varsovion, kie li edukigis kaj lernis la muzikan teorion ĉe konata tiam muzik-instruisto A. Freyer, lerninto de la pola oper-komponisto Elsner.

En la jaro 1831 M. revenis al la gepatroj, kiuj, malriĉiĝinte, ekloĝis en Minsk kaj sendis sian filon en la tiean gimnazion. La studojn pri muziko M. daŭrigis tie sub gvidado de D. Stefa-

nowicz ĝis la jaro 1835, kiam M. forveturis Berlinon, por studi dum kvar jaroj la teorion de supera muziko ĉe profesoro Rungenhagen.

En la jaro 1839, Moniuszko revenas hejmen, ekloĝas en Vilno, kaj, edziĝinte sen-dote, li devas malfacile perlabori la ĉiutagan panon kiel orgenisto kaj malmulte pagata muzik-instruisto.

Malgraŭ siaj materialaj zorgoj la 21 jara muzikisto fariĝas baldaŭ gvidanto de la tuta artista movado en Vilno: li aranĝas koncertojn, akompanas fortepiane aŭ direktas la orkestron, kaj li komponas multe da kantoj, kiuj famigas lin kiel talentan komponiston en la tuta Pollando; liaj kantoj, eldonitaj ĉe Bote kaj Bock en Berlino, estas ankaŭ tre ŝatataj inter germanoj.

Vigligite per tia sukceso, Moniuszko komencas en la jaro 1840 komponi serion da malgrandaj operoj (Idealo, Loterio, Karmanjol, Nova Don Kihoto, Noktloĝejo en Apeninoj, Flava Noktĉapo, Idilio kaj aliaj), kiujn li, per amatoraj fortoj, prezentas en Vilno.

Sed pli da famo kaj aplaŭdo, ol per tiuj operetoj, li akiras per siaj kvar « Kantaroj ». Plenaj de originaleco, freŝeco kaj de nacia karaktero melodioj, apogitaj sur grandioza akompanaĵo, ili movas ĉiujn korojn, kapablajn ekbati pli vive je vera belo. Tiu ĉi serio da kantoj laŭ tekstoj de eminentaj polaj poetoj kreis al la pola muzik-literaturo heredajon same riĉan, kiel tiu, kiun Schubert postlasis al la germanoj.

En la jaro 1847 Moniuszko kreas sian ĉefverkon, la operon « Halka », kaj prezentas ĝin, komence duakte, en formo de koncerto sen kostumoj. En la jaro 1853 la opero aperas sur la Vilna scenejo, kaj, post multaj klopodoj, la 1 de Januaro de l' jaro 1858, pli-grandigite¹, kvarakte, sur la scenejo de Varsovio.

Tio estas memorinda dato en la historio de la pola opero, kiu de nun komencas novan epokon de vivoplena, originala ekzisto.

Neaŭdita sukceso kaj nehaltanta entuziasmo de la publiko salutis tiun ĉi ĉefverkon en Varsovio, kaj saman sukceson akiras

1. La karakterizaj « Dancoj de montaranoj », la potenca, vivoplena « Mazuro » kaj la senkompara, mirinde bela ario « Bruas pinoj » antaŭe ne ekzistis kaj estis interalie nove aldonitaj.

« Halka » sur aliaj scenejoj. Oni prezentas tiun ĉi operon en Krakovo, Lvovo, Poznanio, Kijevo, Odeso, Moskvo, Petersburgo, Prago, Lublano, Vieno kaj aliloke.

En Varsovio, sole, « Halka » estis prezentita jam preskaŭ 700 foje, kaj restas ĉiam same alloga, kvankam ĝiaj melodioj fariĝis delonge la komuna propraĵo de la pola nacio. Neniu el la poste aperintaj polaj operoj atingis tian popularecon¹.

Grandioza, bonege sukcesinta koncerto en Marto de l' jaro 1858 liveris al Moniuszko la monrimedojn por nova vojaĝo eksterlanden, kie la pola muzikisto interkonigis kun Liszt, Rossini, Meyerbeer kaj aliaj.

En Parizo M. finas ĉarman bildon el vilaĝana vivo kun mirinde karakteriza muziko, la unuaktan operon « Flosisto », prezentitan en la sama jaro en Varsovio.

Fariĝinte direktoro de la pola opera scenejo en Varsovio, Moniuszko kreas en la jaro 1860, laŭ teksto de Wolski, la operon « Grafino », ĉefverkon de sprito, ĉarmo kaj arta finiteco.

En la jaro 1861 li prezentas la unuaktan operon « Verbum Nobile », belan scenejan bildon, ilustrantan vive kaj vere la polajn malnov-nobelajn morojn kaj kutimojn.

En la jaro 1865 aperas sur la varsovia scenejo lia « Terura Kortego », granda kvarakta opero, belega muzika pentraĵo, en kiu estas prezentitaj la hejma vivo, kutimoj, superstiĉoj, naciaj virtoj kaj malvirtoj de pollandanoj.

« Halka », « Grafino » kaj « Terura Kortego » fariĝis, pro sia belega, hejme sonanta muziko kaj la simpatia enhavo, la plej ŝatataj, eterne junaj, naciaj polaj operoj.

La sekvanta triakta opero « Paria », komponita laŭ dramo de Delavigne kaj prezentita en la jaro 1869, estas verko, en kiu Moniuszko volis illustri la sentojn de siaj herooj per muziko kos-

1. La fortepiana partituro, kun tekstoj pola kaj itala, aperis ĉe Gebethner kaj Wolff en Varsovio (prezo 6 Sm.). La ankaŭ aparte riceveblajn 20 numerojn, el kiuj ĝi konsistas, ni citas en la fino de tiu ĉi libro. — La orkestran partituron eldonis la Varsovia Muzika Societo (prezo 100 Sm.). — Forteplanan partituron por kantvoĉoj kun subskribita teksto esperanta preligis la tradukinto.

mopolita; sed ĝi pruvis, ke la genia komponisto scias nur prezenti la polan animon, kaj la opero ne havis sukceson, same kiel lia lasta opero « Beata », prezentita mallonge antaŭ lia morto en la jaro 1872.

Ne estas eble citi la titolojn de ĉiuj muzikverkoj de Moniuszko. Krom operoj li komponis kantatojn (Milda, Niola, Sinjorino Tvardovska, Krimeaĵ Sonetoj, Fantomoj kaj aliaj), el kiuj la du laste nomitaj estas veraj ĉefverkoj. Precipe la « Fantomoj », komponitaj laŭ verko de Mickiewicz « Dziady » (Festo de Mortintoj), estas plenaj de lirismo kaj korskuanta drama potenco. Krom tio Moniuszko komponis : sep mesojn, multe da himnoj, psalmoj, religiaj kantoj, gradualoj, tri litaniojn, muzikon por diversaj melodramoj kaj baletoj, kaj ses polonezojn. Li verkis ankaŭ, laŭ siaj prelegoj en la varsovia Muzika Instituto « Lernolibron de Harmonio ». Sed plej riĉan heredaĵon li lasis al sia patrujo en siaj ĉirkaŭ 400 kantoj.

Pri tiu ĉi kantara trezorejo diras la fama rusa komponisto Sjerov, ke li ne hezitus meli ĝin apud la plej bonaj lirikaj komponaĵoj de la okcidenta Eŭropo, kiujn esprimas la nomoj de Schubert kaj Schumann. Same la fama germana kritikisto Fink diris sialtempe en la *Allgemeine musikal. Zeitung* : « La plej eminenta eco de Moniuszko estas la fabela melodieco, kiu ĉi-tiurilate starigas lin super ĉiuj samtempaj eŭropaj komponistoj. »

Sed oni demandas : Kial Moniuszko, malgraŭ sia grandega talento ne staras en la unua vico de la plej gloraj, klasikaj eŭropaj komponistoj, kvankam li superis ilin preskaŭ ĉiujn kiel melodiisto? — La kaŭzon klarigas prof. A. Polinski jene : « La genia pola muzikisto ne sufiĉe atentis la teoriajn kaj praktikajn akirojn de siaj plej grandaj samtempoj ». Moniuszko preferis muzikon simplan, facile kompreneblan kaj memoreblan, ol muzikon t.n. profundan, do li pli ŝatis Haydn'on kaj Mendelsohn'on ol Beethoven'on aŭ Wagner'on.

Sed ĉu Moniuszko kun alia « profunda » muziko fariĝus same populara? — Ni dubas. — Lia belega muziko, parolante rekte al koro, ravas ĉiujn, ne nur la muzik-scienculojn. Do ankaŭ nia

diversnacia esperantistaro certe ne kulpigos Moniuszk'on por tio, ke lia ĉarmoplena, melodiĉa « Halka » estas por ĉiuj tiel facile komprenebla.

WŁODZIMIERZ WOLSKI (Vlodimiro Volski), pola poeto kaj romanverkisto, naskiĝis en la jaro 1825 en Pultusk kaj edukiĝis en Varsovio. Li apartenas al plej talentaj reprezentantoj de rondeto da junaj varsoviaj literaturistoj, epigonoj de la granda pola romantika epoko (1830-40), kiuj inter la jaroj 1840-50 distingiĝis per brua vivo malgraŭ malriĉeco kaj per sincera amo al la popolo kaj arto.

Wolski estis fidela prezentanto de la ideoj kaj tendencoj de tiu ĉi rondeto en sia poemo « Poloska », en la teksto de « Halka », en la grandioza fantazio « Fryderyk Szopen » (Friderik Ŝopen)¹, kaj en aliaj poeziaj verkoj (Poezioj, Vilno 1859, 2 vol.).

Fariĝinte poste novelisto, W. eldonis en la jaroj 1850-58 serion da pli grandaj rakontoj, kiujn karakterizas talento kaj vereco (Nigra Rubando, Kaĉuĉa, Helplecionisto, Granda sinjoro, Rideto de Sorto, Vilaĝa instruisto, Dometo ĉe strato Kolomba).

Sed li distingiĝis precipe kiel aŭtoro de tekstoj al du plej belaj operoj de Moniuszko « Halka » (1858) kaj « Grafino » (1860). En la jaro 1861 Wolski devis forlasi Varsovion kaj elmigri eksterlanden, kie li loĝis, okupigante pri literaturo, en Bruselo, ĝis la morto en la jaro 1872.

Lian literaturan heredaĵon kovris hodiaŭ plejparte la polvo de la tempo. En la animo de la pola nacio vivas nur ankoraŭ kaj estos kredeble neniam forgesitaj : la nomita belega fantazio, ilustranta poezie, per sublima, artoplena verso, la animon kaj la kreaĵojn de la plej granda pola muzikisto, kaj la du tekstlibroj « Halka » kaj « Grafino ».

Ambaŭ « libretoj » leviĝas alte super la kutima nivelo de tiaj helplaboroj, kaj eĉ sen muzika ilustro, kiu estas ja ĉiam la ĉefa, ofte la sola belo de opero, ili havas sian apartan, memstaran valoron.

1. Laŭ franca ortografio : Frédéric Chopin.

La kortuŝantaj arioj de Halka kaj Jontek estas veraj perloj de lirika poezio kaj ili povas per si mem ornami ĉiun poezian antologion. Kelkaj el ili, aperinte jam antaŭe en internacia traduko, ravis la esperantistaron. Ni opinias do, ke interese estos al la samideanoj ekkoni la tutan tekston de la *unua esperanta opero*, kiun espereble multaj el ni admiros sur la scenejo dum nia jubilea Krakova Kongreso.

LA TRADUKINTO.

ALIAJ VERKOJ DE L' SAMA AŬTORO

Kondukanto de l'interparolado kaj korespondado kun Antologio internacia (Hachette et C ^o)	
Mazepa, trad. el J. SLOWACKI (Hachette et C ^o)	
Halka, trad. el W. WOLSKI (Hachette et C ^o)	
La juĝo de Oziris, trad. el H. SIENKIEWICZ (Jan Günther)	
Kio okazis foje en Sidono, trad. el H. SIENKIEWICZ (Jan Günther)	
Consilium facultatis, trad. el J. FREDRO (Jan Günther).	
Nova Antologio (poezia) (Jan Günther).	
La Tagiĝo (Jan Günther).	
Libroj de Profetoj (poemoj) el A. LANGE (Jan Günther)	
Granda Vortaro Pola-Esperanta (M. Arct).	
Malgranda Vortaro Pola-Esperanta (M. Arct).	
La Liro de Esperantistoj (M. Arct)	

PERSONOJ

REGA TABLESTRO (Stolnik).

ZOFIA, lia filino.

JANUŜ.

ZJEMBA, konfidato de Stolnik.

JONTEK

HALKA

SAKFAJFISTO

MALJUNULO, unu el gastoj.

} vilaĝanoj el bieno de Januŝ.

La afero okazas en la dek-oka jarcento.

HALKA

AKTO UNUA

En la urbo, en la domo de la reĝa tablestro (Stolnik).

Flanka salono. Profunde de la scenejo estas tri altaj vitropordoj kun elirejo en la ĝardenon. Sur unu flanko de la rigardantoj oni vidas pordon duonmalfermitan al la balsalono, sur alia flanko estas tablo, apud kiu sidas la gastoj, festenantaj kun Stolnik; Zjemba kuretas laboreme kaj plenversas la pokalojn. El la balsalono, helege lumigita, aliaj gastoj eliras po-pare, dancante la polonezon, kaj ili rondiras en la salono.

SCENO I

STOLNIK, ZJEMBA, kaj ĤORO DE GASTOJ.

ZJEMBA.

Longe vivu paro juna!
Gefianĉojn benu Dio!
Floru amo, harmonio,
En ilia vivo kuna!
Du juveloj sin ja ligas
De antikva virt' polana,
Du blazonoj sin kunigas:
Odrovonja kaj Pomjana.

HALKA

ĤORO.

Vivu, vivu! — paro juna!
 Amo en la vivo kuna
 Harmonie ligu vin!
 Jen antikvaj du juveloj,
 Du blazonoj de nobeloj,
 Digne unuigas sin.

ZIEMBA kun ĤORO.

Ni rigardu kun kortuŝo!
 Tut-egala ind' ilia:
 Ĝust-kreita por Januŝo
 Stolnik-filino Zofia!

KELKAJ GASTOJ.

Jen egala juna paro,
 Per beleco kaj dotaro!
 En feliĉo kaj bonsano
 Longe vivu! longe vivu
 Odrovonjo kaj Pomjano!

STOLNIK.

Al sinjoroj ni el koroj
 Dankas por dezir-dediĉ'.
 Do, amikoj! al kalikoj!
 Ni amu nin!

ĤORO.

Por-feliĉ'!

(Zjemba kun la Ĥoro foriras, kriante ankoraŭ: « Ili vivu! ».)

SCENO II

STOLNIK, ZOFJA, JANUŜ (enirante el salono).

JANUŜ.

Benu, patro kaj sinjoro!
 Tiel nomas mi jam vin.

AKTO UNUA

ZOFJA.

Vi elektis per favoro,
Kore mi deziris lin.

(Kune.)

Benu, patro kaj sinjoro!
Jen humila peto nia.

STOLNIK.

Longe ligo la beata
Estis kor-deziro mia.

ZOFJA kaj JANUŜ.

Benu, patro, plej amata!

STOLNIK (benante).

Via volo, Di-sinjoro,
Ĉiel-patro, estu do!
(Audigas kanto malantaŭ la scenejo :)
Kiel rompita vente arbeto
Estas animo la mia.

ZOFJA.

Jen kies voĉ' ?
(Kanto malantaŭ la scenejo :)
Kie vi estas, roza kroneto,
Kie vi floro lilia ?

ZOFJA.

Malĝoja tia!!

Vi, Januŝ, ne konas ĝin?
(Kanto malantaŭ la scenejo :)
Ĉion forprenis, Janko-karulo,
Kion fordoni mi povis...

JANUŜ (konfuzite al Zofja).

Mi ne konas...
(Flanke.) Ho ĉagreno!

Kiu alkondukis ŝin?
(Kanto malantaŭ la scenejo :)
Ĉie lin serĉas mia okulo,
Sed lin nenie retrovis...

Halka

STOLNIK.

Kiu nokte en ĝardeno
Kantas, mi ne scias ĝin?

JANUŜ (flanke).

Voĉo jen de Halka sonas...
Ŝi aperis tie ĉi?
Eble ree frenezanta...

ZOFJA.

Januŝ! Kial do ekstere
Plendas kanto malespere?

STOLNIK.

Malrespekto aroganta!

(Li volas iri en la ĝardenon, Januŝ lin haltigas.)

JANUŜ (kortuŝite al Zofja).

Mia kara fianĉino!
Tiu kanto al ni diras :
Ĝoje tremas nia sino,
Tie Brust' malgaje spiras!
Sonas plenda ĝem',
Mi rigardos mem!

ZOFJA (al si).

Kiel ĝoje tremas sino!
Kaj mi kore lin admiras :
Al mizero de virino
Doni helpon li deziras!
Sonas plenda ĝem'
Do li iras mem!

STOLNIK.

Malmodesta la virino!
Sed ĉagrene kanto spiras...
Doni helpon ni deziras.
Ĝoje tremas nia sino,
Tie sonas ĝem'!
Vi rigardu mem!

(Li foriras kun Zofja, kiu kun admiro rigardas Januŝon.)

Kune.

SCENO III

JANUŜ (sola, maltrankvile).

(Recitativo.)

Kial ŝi venis ĉi-tia-hore?
 Ĉu sendas ŝin la infero?
 La plendon mi sentas dolore,
 Sed tro malfrua jam afero.
 Alian mi ekamis kore...
 Ha! jen larmoj de sufero!...
 Ŝin konsolu vort' favora...
 Kaj poste for! for! for!
 De larm' dolora.

(Kanto.)

Kial en horo soleca tia,
 Kiam sopiris mi en montar',
 Ekbrilis ĉarma vizaĝo via,
 Ekbrilis blonda harligo via,
 Buŝo korala, ridet' radia,
 Pupiloj bluaj sub okulhar'?
 Kial animo, kiel rivero
 De l' vent' subite ekscitis sin?...
 Sur vin, orfino, sola sur tero,
 Sur vin, orfino, falis mizero,
 Eterne sekvas vin malespero,
 Kaj via plendo doloras min.

SCENO IV

JANUŜ, HALKA (ŝi eniras ne vidante lin komence).

HALKA.

(Kanto.)

Kiel rompita vente arbeto
 Estas animo la mia.
 Kie vi estas, roza kroneto,

HALKA

Kie vi floro lilia?
Ĉion forprenis Janko, karulo,
Kion fordoni mi povis;
Ĉie lin serĉas mia okulo,
Sed lin nenie retrovis.
Kie vi estas, falko aera,
Kie vi, mia brilanta suno?
Mi, kiel kampá flor' en aŭtuno,
Sen vi, pereas mizera.

(Si turnas sin kaj, ekvidinte lin, kun gojkrio kuras al li kaj kaptas
lian manon.)

Ho Janko, karulo!
Jen, Jontek diris, min malĝojigis,
Ke vi forlasis min, pereigis...
Sed mi vin vidas! Mi kapon premas
Al via brusto! Mi ĝoje tremas!
Kaj vi min same rigardas nun,
Ho, mia falko! ho, mia sun'!

JANUŜ (flanke).

Kiel mensogi? Ah! — en momento,
Kiam ĉi larmoj por mi turmento.

(Al Halka.)

Vana la ploro, sufero via!
Ĉu vin forlasi mi iam volis?
Sed nun foriru, ke onklo mia
Ne vidu, ke ni interparolis!
Tamen ne timu! Vin fort' neniam
El mia koro forigos nun!

HALKA (ravite).

Ho, mia falko, ho, mia sun'!

JANUŜ (forŝovas sin delikate).

Trankvile do, trankvile nun!
Mi ne forgesos, mi ne forlasos!
Vi iru ekster la urba muro,
Atendu tie, apud Vistul',

AKTO UNUA

Ĉe kruca vojo, ĉe sankt-figuro,
Mi venos tuj, via karul'...
Kaj baldaŭ jam revenos ni
Al la montar'... tie feliĉ'
Atendas nin.

HALKA (ripetas ĝoje).

En la montar', ree feliĉ'
Atendas nin.

JANUŜ.

Kun kiu vi?

HALKA (ne atentante).

Ho, mia falko!

JANUŜ.

Vi venis mem?

HALKA (ne atentante, ĉiam pli ĝoje).

Ho, suno mia!
Sinjoro bona jen restis vi!

JANUŜ (urgante).

Foriru nun! mi venos mem!

HALKA.

Sinjoro!

JANUŜ.

Foriru nun! mi venos mem!

HALKA.

Sinjoro bona! ĉiam amas min...

JANUŜ.

Iru, mi petas vin!

HALKA.

Vi min ne forlasos, karo!
Sed revenos al montaro,
Falko de mi!

Ĉe l' toreato mi ne plendos,
 Sed sopire mi atendos
 Ĝis alflugos vi.
 Ni por ĉiam nin kunigos,
 Sole morto nin disigos,
 Se ordonos tion Di'!

JANUŜ (maltrankvile).

Jes, mi vin ne lasos, kara,
 Sed revenos al montara
 Hejmo de ni.

Vi ne ploros, vi ne plendos,
 Sed trankvile min atendos,
 Ĝis revenos mi.

Ni denove nin kunigos,
 Sole morto nin disigos,
 Se ordonos tion Di'!

(Alpremite sin al sia koro, li forkondukas sin en la ĝardenon, fermas ĉiujn tri pordojn kaj iras medite en la salonon. La gastoj haltigas lin sur la sojlo.)

SCENO V

JANUŜ kaj la GASTOJ.

UNUJ.

Kie estas jun-sinjoro?
 En festena, ĝoja horo!

JANUŜ (devigite gaje).

Estas mi, tie ĉi.

ALIAJ (ĉirkaŭante lin, pli mallaŭte).

Sort' feliĉa al vi brilas,
 Zonjo bela, kiel stel'.

JANUŜ (medite donas al ili manon).

Dankas mi, dankas mi!

KELKAJ.

Vi gratulas kaj babilas,
Jen... muzikas la kapel'!

SCENO VI

LA SAMAJ, STOLNIK.

(Stolnik tenas Zonjon sub la brako. Zjemba kun argenta kruĉo; unu el gastoj tenas en mano grandegan pokalon el la tempo de la reĝo Zigmunt. En la salonpordo montriĝas kelke da virinoj.)

ĤORO (riverencante al Stolnik).

Ho, tablestr', kompatu do!
Vi ripozu ne permesas,
Manĝi, trinki ni ne ĉesas,
Ni festenas tro!

UNU EL GASTOJ (malpleniginte la pokalegon, transdonas ĝin al Zjemba).
De l' ŝatinda mastro sanon!

ĤORO.

Ho, tablestr', kompatu do!
K. l. p.

DUA EL GASTOJ (al kiu trinkis la antaŭiranta).
De l' ŝatinda parencaro!

STOLNIK (kortuŝite, lasas la manon de Zofja kaj riverencas al ĉiuj kore per capo.)

Karaj moŝtoj! sinjoraro!
Konfuzite, mi ne scias
Kiel danki plej korsente,
Tiomflanke ĉi-momente
Sur min fluas alt-honoro.

(Kun larmoj.)

Jen, kunsentas vi en koro,
Ke la sol-posteulino,
Mia Zonjo, solfilino,
En la vidva mia stato

Baldaŭ patron jam forlasos
Por kuniĝi kun amato.

JANUŜ kaj ZOFJA (kliniĝante al liaj piedoj).

Patro kara!

STOLNIK (levas ilin).

Ho filino, kar-infanoj!

Do, sinjoroj, vi permesu,

(Al gastoj pli gaje.)

Kaj amuzi vin ne ĉesu!

ĤORO.

Vivu! Vivu!

STOLNIK (vigle).

Junularo! nun po paro

Vi ekdancu fajranime!

Salte, kure, hop! mazure

Kalkanfrapu pol-kutime!

ĤORO.

Vivu! Vivu!

ZJEMBA (mallaŭte al Stolnik).

Jen propono! En salono

Oni dancas fajre, vive.

Provu ni laŭ sama tono!

STOLNIK.

Kara Zjembo! efektive!

Mi konsilon laŭdas vian!

ZJEMBA (en salonpordo).

Muzik'! Dancon mazovian!

(Oni aŭdas el la salono muzikon, kiu ludas la « mazuron »; enkuras dancantaj paroj. — Zjemba rondiras plue kun la kruĉo, kiun la servistaro replenigas de tempo al tempo, kaj kun kaliko. — Post ĉiu toasto aŭdigas: — vivu! Stolnik kun Zofja kaj kelkaj gastoj, sinjoroj kaj sinjorinoj, sidigas. Januŝ, malantaŭ ili, staras medite.

La kurteno falas.

AKTO DUA

Spaliro en ĝardeno. Dekstre oni vidas lumigitajn fenestrojn en la domo de la reĝa tablestro. Profunde estas muro kaj pordeto. — Halka iradas inter la arboj. — Nokto.

SCENO I

HALKA (sola).

Jam tie genui mi volus
Ĉe la kruco, apud vojo!
Larmojn de mia malĝojo
Vidus Sankta Virgulino,
Ĉenstohova Dipatrino;
Ŝi komplete min konsolus!
La orfinon en mizero
Kaj senĉesa kor-sufero!
(Post momento, rigardante ĉirkaŭen.)
Kie Jontek?
Tie danco kaj muziko!
(Oni aŭdas muzikon en la domo.)
Jen la nokt'!
(Post momento pli gaje.)
Jen adiaŭ falko diros,
Sed reflugos li al hejma mont',
Tage, nokte mi sopiros,
Tut-anime lin deziros,
Ĝis feliĉa, ĝoja la renkont'.

(Kanto.)

Suprenflugi volus mi kun alaŭdeto,
 Flirti en aero kiel hirundeto,
 Naĝi kun fiŝeto en torento klara
 Al vi, Janko kara!

Ĉar mi nek fiŝeto sur Vistula fundo,
 Nek mi alaŭdeto estas, nek hirundo,
 Nur al mi kantetas vento la montara :
 Venos Janko kara!

Se mi super fonto, kiel stel' radia,
 Min speguli povus en animo via!
 Kiel vaga lumo, kiu flamas pale,
 Se al vi ekbrilus mia larm' kristale!
 Ĉar mi nek steleto en la font' brilanta,
 Nek mi estas kampa lumo la vaganta,
 Fluas do sur roso mia plend' sen fino :
 Ve, al vi, knabino!

SCENO II

HALKA, JONTEK (serĉas ŝin inter arboj).

JONTEK.

Halka! Halka!

HALKA (alkuras al li).

Kial vi, Jontek, trompis malbele
 Min, senkonsolan?
 Kial vi prenis de mi kruele
 La ĝojon solan?
 Jen, mi lin vidis, al mi parolis
 Li, sun' radia!

(Konvinkite.)

Kaj li revenos, kaj min reprenos!

JONTEK.

Malfeliĉa koro via!

HALKA.

Ĝi preskaŭ krevis, tiele batis

En mi la koro...

(Iom riproĉe.)

Ah! Jontek! Jontek, vi ne kompatis

Kun la doloro...

JONTEK (iom moke.)

Ha! ha! ha!

HALKA (mirigite).

Vi ridas? Do foriru ni!

JONTEK

Foriru ni!

HALKA (rigardante maltrankvile).

En granda urbo mi sentas timon;

Io vilaĝan premas animon!

Ne vidas ni

Belsunon-ĉi,

La leviĝantan.

Ne vidas ni

Belsunon-ĉi,

La subirantan.

Ni iru for! Tiu muraro

Timigas min, lacigas min.

Rapidu ni al la montaro,

Al hejmo. — Li atendas min

Post urbo jam! ĉu ridas vi?

JONTEK.

Ni iru do, se vere li

Atendas vin.

(Kantas ironie kaj kompate.)

Vi malfeliĉa kredas knabino,

Ke li ne trompas, lin kredas vi!

HALKA.

Kiel en vento
 Bruas la pino,
 Kiel torento
 Fluas sen fino,
 Mensogis li, ne venos li,
 Kaj vi lin kredas, kredas knabino!

HALKA.

Kredas, kredas mi!

JONTEK.

Ne konas amon de sinjorido
 Al montanino, ne konas vi!
 Lia vizaĝo dolĉa laŭ vido,
 Parolo dolĉa de sinjorido,
 Sed ŝtona kor'
 Por via plor'!
 Vi kredas amon de sinjorido?

HALKA.

Malica-vi!

JONTEK.

Li ekposedis vian animon.
 Ilo! belsinjoron ŝatas knabin'!
 Mia sopiro ne havis limon,
 Deziris mi. — Li foje venis,
 Rigardis vin, posedis vin,
 Prenis kroneton, animon prenis.
 Ho mia Halko! mizerulino!
 Ke li ne trompas, lin kredas vi?
 Kiel en vento
 Bruas la pino,
 Kiel torento
 Fluas sen fino,
 Mensogis li, ne venos li, —
 Kaj vi lin kredas, kredas knabino!

(Post momento.)

Vi pensas : tial alvenis ni,
Ke vi feliĉe, ke vi plengoje
Jankon-karulon revidu foje?

(Montrante al ŝi la lumigitajn fenestrojn :)

Jen! en ĉi-hor'!

Kun belfraŭlino dancas ĉe kor'.

Kiel fianĉ' — via sinjor'!

(Malantaŭ la scenejo aŭdigas la ĥoro de gastoj :)

Jen egala juna paro,
Per beleco kaj dolaro!
En feliĉo kaj bonsano
Longe vivu, longe vivu
Odrovonjo kaj Pomjano!

HALKA (netuŝita komence de la ĥora voĉo, komprenas fine, ekkuras kaj komencas frapi forte la pordon).

HALKA (ĉiam pli forte batante la fermitan pordon).

Enlasu min, enlasu min!

Al patro de mia infano!

JONTEK.

Ni iru el ĉi-tie,

Oni ekvidos vin!

HALKA.

Enlasu min, enlasu min!

(Al Jontek, petegante lin surgenu.)

Al mia sinjoro,

Ah, Jontek! gvidu min!

JONTEK.

Oni ekvidos vin,

Insultos vin.

SCENO III

LA SAMAJ, ĤORO DE GASTOJ, ĤORO DE SERVISTARO
(kun lumo) kaj ZJEMBA

ĤORO.

Jen kia bru'?'
Pro kio kri'?'
Kaj la murmur'?'
Ne scias ni!

ZJEMBA kaj ĤORO.

For! forlasu balon!
Ĉe servistoj ili
Trovos bonregalon,
Povos gaj-babili,
Sed el balo for!

SCENO IV

LA SAMAJ kaj JANUŜ (enkurante).

JANUŜ (donas signon per mano).

Kio?

(La ĥoro foriras malantaŭen de l' scenejo; Januŝ, proksimiĝante al Halka, mallaŭte.)

Mi vin ja petis, mi al vi diris...
Vi ne foriris?

HALKA (rigardas lin malgaje, kaptas subite sian kapon kaj silente sidiĝas sur benko).

JONTEK (eniras fronten de la scenejo, humile kliniĝante antaŭ Januŝ).

Sinjor' — jen — mi!

JANUŜ (rekoninte lin, kun kvietigala kolero).

Pro kio vi kondukis ŝin,

El la montar', knabinon en sufero?

Ĉu hejme do malbone tro?

Ŝi en mizero?

Do diru, kion volas vi?

(Flanke.)

Malbenitul'!

Mizerulin'! frenezas en ĉi-horo!

(Kolere.)

Konduku ŝin, al hejmo gvidu ŝin

Kaj servon vian — memoros la sinjoro.

JONTEK.

Kompatu do, ho vi sinjor'!

Nun ŝia patro mortis for;

Patrinon longe kovras tero...

Kun orfino Dio sola kaj — maldolĉa plor'.

(Malpli laŭte.)

Ĉe homoj moko — kaj ofenda vort'...

(Silentas momente, poste kun ironia humileco.)

Ho, bonsinjoro! jen terura sort'!

Do rekompencos Di' kompaton al mizero!

SCENO V

LA SAMAJ, KELKAJ GASTOJ, STOLNIK kaj ZOFJA.

(Januŝ kuras renkonten al ili kaj diras, ke Halka estas freneza.)

HALKA (leviĝas malrapide).

(Kanto.)

Iomet' post iometo

Logis vi la kolombeton!

Iomet' post iometo

Bele-blankan kolombeton

Vi delogis, ho falketo!

Vi delogis ĝin!



ZOFJA, STOLNIK, ZJEMBA kaj ĤORO.

Stranga jen knabino!
Kantas kun obstino.
Oni ŝin forsendas,
Sed ŝi plue plendas,
Ne atentis nin.

JONTEK (kun la antaŭirantaj).

Malfeliĉulino!
Via plend' sen fino,
Ĝi ne vekos korojn;
Ĉar la gaj-sinjorojn
Rid' amuzas nur!

ZOFJA (atente rigardas Januŝon, kiu maltrankvile rigardas Halkon).

Ili iru for!

JANUŜ (turnas sin al Halka kaj donas signon al Zjemba).

ZJEMBA (al Halka kaj Jontek).

Foriĝu, for!

ĤORO.

For! forlasu balon!
Ĉe servistoj ili
Havos la regalon,
Povos kunbabili.
Sed el balo for!

STOLNIK.

Strange, je honor'!
Zjemba, vi disponu:
Servistar' al ili
Bon-regalon donu;
Sed el balo for!

JONTEK.

Ni ne volas balon!
Nek la bonregalon,
Petas pri nenio.

Kune kun la Ĥoro.



Nin kondukos Dio,
Mem ni iros for.

ZOFJA (flanke rigardas Januŝon ĉiam pli atente).

Jen okulo ŝia
Sub la larm-vualo!

Maltrankvila mia
Januŝ dum la balo —
Strange batas kor'!

JANUŜ (flanke).

Ŝin la dia mano
Gvidu en mont-valon!
Kaj la vilaĝano
Ne malhelpu balon!
Ili iru for!

(Halka kun Jontek malrapide foriras. — Bildo.)

La kurleno falas.

AKTO TRIA

En vilaĝo de Januŝ.

Inter la dua kaj tria aktoj forpasas unu monato. Monta kaj roka vilaĝa ĉirkaŭaĵo, vespere ĉe suna subiro. Unuflanke de la rigardantoj estas videbla angulo de drinkejo, antaŭ kiu sidas sur benko kelke da vilaĝanoj, montanoj kaj montaninoj; kelke da ili sidas sur montoj kaj rokoj; aliaj eniras el la alia flanko. El malproksime aŭdiĝas la vespera dioserva sonorileto.

SCENO I

HORO DE VILAĜANOJ.

Post vespera servo dia,
Antaŭ suna bel-subiro,
Jen dimanĉ-amuzo nia!
Tutan ni semajnon ŝvitas,
Iom distri nin meritas,
Nia sola jen akiro!

JUNULOJ.

Baldaŭ venos junsinjoro
Kun la bela fianĉino;
Dum edziĝa, festa horo
Nin regali ne forgesos.

MALJUNULOJ.

Pro edziĝo de sinjoro
La Mizer' ĉe ni ne ĉesos,
Sekvos nin la diablino.

ĈIUJ.

Sekvos nin la diablino.

(Post momento.)

Estu vigla, estu gaja
 Tiu ĉi dimanĉa horo!
 Morgaŭ tago de laboro —
 Kaj post morgaŭ la laboro,
 Poste tago pli laciga,
 Poste ĉiam pli laciga.
 Estu vigla, estu gaja
 Tiu ĉi libera horo!

KELKAJ (sidantaj sur montoj).

Jen najbaraj vilaĝanoj!
 Venas indulgenc-festanoj!

(La samaj, alvenas montanoj, montaninoj kaj diversaj vilaĝanoj.)

ALVENINTOJ.

Estu do laŭdata Kristo!

LOKANOJ.

Eterne.

(Salutado. Ili regalas sin per brando. — Dancoj de montaranoj kun malgranda aldono de dancoj krakovaj. Fine la venintoj disiras; la antaŭaj restas.)

SCENO II

LA SAMAJ kaj JONTEK (malrapide iras malsupren de 1^a montoj kun Halka).

ĤORO.

Rigardu! Kion?
 Kiu alvenas kun junulino?
 Jes! li — Jontek, sed knabino?

JONTEK.

Estu do laŭdata Kristo!

ĤORO.

Eterne.

HALKA

JONTEK.

Donu ĝojon Di'!
Sed mizeron ne forigos
Gaja melodi'!

ĤORO.

Jen Halka!

JONTEK.

Ĝi estas!
El nia vilaĝet'.

ĤORO.

Vi revenis do el kie?
Vi kondukas ĝin el kie?

JONTEK.

El la urbo mi revenas.

HALKA (ŝreneza).

Venas mi de l' sinjorido;
Vi ne konas min laŭ vido,
Ĉar ŝanĝita birdon mi.

(Kantas.)

Kial, por mizero mia,
Flugis vi al kampo nia?
Kial logis kolombeton —
Kaj delogis ĝin, falketo!
Bele-blankan kolombeton
Vi delogis ĝin!

ĤORO.

Jen ŝanĝita, jen mizera!
Vidi ĝin, premiĝas kor'!

JONTEK.

Jen, ludilo de sinjor'!
Al amajoj tia fino!
La sinjor' ĉe l' fianĉino,
De tablestro belfilino, —
Ĝin forigis el memor'.

HALKA.

Sed ne vendis li animon
Al diablo!

ĤORO.

Rakontu, Jontek, pri tio ĉi,
Kio okazis, rakontu vi!

JONTEK.

En fianĉiĝa venis ni horo,
Kaj ŝin ekvidis nia sinjoro.
Li tre afable, dolĉe parolis,
Kaj ŝin karese, trompe konsolis.
Post urb' atendi promesis ŝin.
Mensogon-ĉi indignis kor',
Mi veron diris al ŝi. Kaj nin
Li kiel hundojn peligis for.

ĤORO (terurite).

Li kiel hundojn peligis for!
(Momenta silento.)

HALKA.

Ree vi venas, por trompi min,
Kara, falko! — ne, ne, ne —
Super montoj kolombeto
Flirtis per laflugiletoj, —
Jam ne estis blanke-pura,
Sed de propra sang' purpura,
Flirtis per laflugiletoj,
Kiel ŝtono teren falis.

ĤORO.

Tian ni vidas finon,
Se amis sinjor' montaninon.
Tia fin' laŭ regul'!

JONTEK.

Jen — leviĝas polva nebul'!
Ĉu sinjoraro venas al balo?

HALKA

ĤORO.

Flugas jen korvo super mont-valo,
Flarsentas, kie

HALKA (finante la kanton).

Kolomb-mortul'.

ĤORO.

Senkulpa estas via animo,
Iu alia estas kulpul'!

JONTEK (suprenirante la rokon).

Jam veturas!

ĤORO.

Veturas!

(Ili iras en montojn.)

Ŝanĝo de dekoracio.

AKTO KVARA

Malfrua vespero; placo ĉirkaŭigita per salikoj. — Unuflanke de la rigardantoj estas ligna preĝejo kun tombejo; duaflanke oni vidas fronton de kortego, plue kabanojn de vilaĝanoj; profunde estas montetoj kaj rokoj, inter kiuj fluas serpentume rivero.

SCENO I

JONTEK (sola, iras malsupren de l' monto).

Ŝi, malfeliĉa, venas per forto!
Do ne sufiĉa mizera sorto!
Ĉiam ŝi pensas pri li, malfidela.
Se lin vidos kun edzino
Eble ŝi mortos!
Ho, Jezu, Di' ĉiela!
Kompate ŝirmu orfinon!
Ŝin gardu, gardu Di'!
(Post momento.)
Oni tie ŝin haltigu!
Mi ne povis.

SCENO II

JONTEK kaj la SAKFAJFISTO (profunde de la scenejo
supreniras monton kaj komencas ludi gaje).

JONTEK (turnas sin subite).

Sakfajfisto! Kial do
Gaje vi ekludis foje?

SAKFAJFISTO.

Por edziĝa fest' — muziko.

JONTEK (balancante la manon).

Frue tro!

Ni komprenas ja pli bone,

Se vi ludas pli malĝoje.

SAKFAJFISTO (ŝanĝas la kanton, demandante).

Niatone?

JONTEK.

Ho, jes, jes, amiko!

(Kanto.)

Bruas pinoj sur deklivo,

Bruas plende for;

Por junul' malgaja vivo

Se doloras kor'.

Ne ofendis min alia,

Sole vi, amata mia!

Oj Halino, sol-knabino,

Amata de mi!

Dum ni estis ida paro

Mi por Halinet'

Serĉis super abismaro

Birdojn en nestet';

Venis mi kun bonodora

Flor' el monta mur',

El foiro kun kolora

Koraleta ŝnur'.

Ne ofendis min alia,

Sole vi, amata mia!

Oj Halino, sol-knabino,

Kulpa estas vi!

Kiel abiet' montara

Ĉarme kreskis vi —

Ah! post vi, knabino kara,
Fajron saltus mi!

Jaroj fluas kun rapido
De torent', sen fin' —
Venis bela sinjorido,
Vi malŝatis min.

Ne ofendis min alia,
Sole vi, amata mia!
Oj Halino, sol-knabino
Amata de mi.

SCENO III

LA SAMAJ kaj HALKA (rapide kuras malsupren de monto, elŝirante sin el
manoj de montanoj kaj montaninoj, kiuj ŝin haltigas).

JONTEK (al ŝi, vive).

Ah! — iru, Halka, for el tie ĉi!

HALKA (obstine).

Ne!

JONTEK (volas ŝin forkonduki).

Tion ne permesos mi.

HALKA (liberigas kaj eksidas sur ŝtono).

Vi min vidos, falko mia!

(La sakfajfisto donas signon, ke la edziĝofesta sekvantaro proksimiĝas;
ĉiuj vilaĝanoj malsupreniras sur la scenejon.)

SCENO IV

LA SAMAJ kaj ZJEMBA.

ZJEMBA.

Bone, jen amaso kia!
Do kliniĝu ĉiuj foje
Kaj salutu laŭte, ĝoje
Junan sinjorinon!

ĤORO.

Ni kliniĝos ĉiuj foje
Kaj salutos laŭte, ĝoje.

SCENO V

LA SAMAJ, STOLNIK, JANUŜ, ZOFJA (eniras laŭvice). EDZIĜANOJ kaj
EDZIĜANINOJ (mallumiĝas).

STOLNIK (eniras).

Kiel fartas vi, bon-homoj?

ĤORO.

Dankas ni al moŝt-sinjoro!

JANUŜ (enirante).

Kiel vi fartas, kiel vi fartas!

ĤORO.

Dankas ni al sinjorido.

JANUŜ (ekvidinte Halkon, flanko).

Dio! venis ankaŭ ŝi!

ZOFJA (enirante kun la edziĝaninoj).

Kiel vi fartas?

ĤORO.

Dankas ni al sinjorino!

Juna sinjorino!

ZIEMBA (al vilaĝanoj).

Ĉu ŝtoniĝis ĉiuj foje?

Ĉu mutiĝis la duono?

Nu! je mia fring-blazono!

Laŭte, aŭ mi per ba...

ĈIUI.

Ni salutis ŝin pli ĝoje!

Dankas ni al bel-fraŭlino,

Nia sinjorino!

ZOFJA (ekvidinte Halkan).

Kiu ŝi estas pala knabino?

ĤORO.

Pala knabino.

ZOFJA.

Malgaja kaj silentanta.

ĤORO.

Malgaja kaj silentanta.

JANUŜ (Ĥanke).

Ne rekonis fianĉino!

ZOFJA.

Kiu ŝi estas knabino,
La suferanta kaj pala?
Mi pri vizaĝo egala
Memoras! — mi vidis ĝin!

STOLNIK.

Kiu ŝi estas knabino?
Jen, Zjemba! — tiu ĉi pala?
Mi pri vizaĝo egala
Memoras, — ni vidis ĝin!

JANUŜ (Ĥanke).

Ŝin ne rekonu Zofio!
Mi tremas, fariĝas pala...
Ah, la renkonto fatala!
Ah, kial vidas mi ŝin!

JONTEK (Ĥanke).

Rekonis ŝin sinjorino,
Kaj lin rigardas, ho Dio!
Eble konjektos pri ĉio
Kaj malestimos ŝi lin.

JANUŜ (Ĥanke).

Ne rekonu ŝin Zofio!
Larmoj de Halka min premas,

Kune.

HALKA

Time kaj honte mi tremas,
Perfide delogis ŝin.

ĤORO.

Rekonis ŝin junedzino,
Nia ili ambaŭ kortuŝas!
Li ŝin apenaŭ forpuŝas,
Jam dua amas lin!

HALKA.

Mian mizeron kompatu Dio!
Ŝirmu per via protekto ĝin!

ĈIUJ (krom Januŝ).

Frenezulino vokas al Dio!
Dio, protektu kaj gardu ŝin!

ZOFJA (al Januŝ).

Jes, certe, mi jam vidis ŝin!

JANUŜ (konfuzite).

Ho jes, — mia amatino!
Ne malaperas memoro
Pri vizaĝo de l' knabino,
Pri freneza la doloro.

HALKA.

Janko! Janko!

JANUŜ (al si, dolore).

Dio juste min ĉagrenas
Pro ŝia plor'!

(Post momento.)

Eble Zofja ne komprenas,
Do rapide ni iru for!
Ŝin, malfeliĉan, gardu Sinjor'!

HALKA.

Jen kolombo
Sur la tombo...

ZOFJA.

Knabino, kion vi diras?

JANUŜ (interrompas insiste).

En preĝejon ni foriras!

Estas temp'! malfrua hor'!

ZOFJA (plorante, alpremas sin al la patro).

De malĝoj' ne esperita

Jen premiĝas mia kor'!

STOLNIK (kortuŝite).

Edzo kore elektita —

Feliĉigu vin Sinjor'!

(Inter la edziĝofesta sekvantaro (krom Zjemba), Januŝ kaj Zofja, kiu apogas la kapon sur la ŝultro de la patro, eniras en la preĝejon.)

SCENO VI

HALKA, JONTEK, ZJEMBA kaj la ŜORO (forkondukante la edziĝofestanojn).

ŜORO.

Por kunvivo longa donu

Dio sian benon!

La feliĉon vi nur konu,

Ĝojon

JONTEK (ŝanke).

Kaj ĉagrenon.

ZJEMBA.

Kiu ekparolis nun?

ŜORO.

Neniu!

ZJEMBA.

Plue do, rapidu vi!

Kaj po paroj, ĉiuj foje,

En la rondo fermu voje

HALKA

Jun-geedzojn! poste foje
Vi ekkantu laŭte, ĝoje,
Dum reveno...

ĤORO.

Ni ekkantos al vi ĝoje.
(Ĉiuj, krom Halka kaj Jontek, eniras en la preĝejon.)

SCENO VII

HALKA, JONTEK (ĉiam pli mallumigas).

HALKA.

Kiel ĝoje! Kiel ĝoje!

JONTEK.

Do vi vidis, do vi aŭdis!
Fine konvinkiĝu vi!

HALKA (pli konscie).

Mia falko? Kie li?

JONTEK.

Tie li!

(Montras la preĝejon kaj enkuras tien.)

HALKA (rigardante).

Ah! (ŝi revenas kaj falas sur teron).

SCENO VIII

HALKA (sola — ĉiam pli mallumigas).
(Kanto el preĝejo.)

Ĉielpatro, Di-Sinjoro!
Sur la teron sendu vi
La kompaton per favoro!
Ĉielpatro, Di-Sinjoro!

HALKA (subite levigante).

Ha! idel' malsata nia
Jen mortas en la kabano!
Patrino-ĉi! kaj patro li!

Manetojn etendas infano
Kaj kompatinde rigardas —
Patrino-ĉi! kaj patro li!
Eĉ rabobirdo idojn gardas,
Varmigas, nutron alportas,
Kaj mia ido jen mortas!

Mia ideto!
Por la ĉerketo
Kiu vestos vin,
Kaj vindos vin?
Kaj kiu lulos
Por morta dorm'?

Do kie kor'? hej! — Janko, kor'?
Por miaj larmoj, por sanga plor'
Mi venĝos nun, bruligos vin!
Kruele koron sangigis vi,
Do mi patrin' — de vi edzin'
Mortigos vin — Janko, vi aŭdas min?

(Kuras furioze kolekti branĉetaron kaj pajlon disŝutitan sur la placo;
ŝi deŝiras kelke da salikaj branĉetoj kaj ekbruligas ilin ĉe la lampo
antaŭ la preĝejo.)

ĤORO (el preĝejo).

Di' potenca, sankta Dio
Je popol' kompatu vi!
Por vi ebla estas ĉio,
Di' potenca, sankta Di'!

Pro turment' de Filo via
En mizero helpu vi!

Pro la ĝemo, ploro nia
Vi kompatu, granda Di'!

HALKA.

Ha!

(Ŝi jetas la faskon da ekbruligita branĉetaro en la riveron, kie ĝi siblante estingiĝas, kaj ŝi mem plorante falas sur genuojn. La luno heligas la ĉiel-lazuron.)

Vi kompatu! sankta Di'!

Di' potenca! dankas mi.

(Post momento kun rezignacio.)

Mi vin mortigus, mian sinjoron?

Janko, karulo vi mia!

Pardonu al mi, mizera, ploron,

Morton de l' ideto nia.

Feliĉe vivu eĉ por alia.

Kaj vin gajigu belsinjorin'!

Min rememoru en preĝo via,

Ho Janko, Janko — mi benas vin!

(Kuras sur la monteton kaj kun krio jetas sin en la riveron.)

SCENO IX KAJ LASTA

JONTEK (kaj ĉiuj, kiuj eniris en la preĝejon, krom Zjemba kaj kelke da edziganoj, elkuras).

JONTEK (ne vidante Halkon, kuras maltrankvile kun kelke da montaranoj sur la rokojn).

Halka! Halka!

(Subite jetas sin en la akvon.)

ĤORO.

Tro malfrue, tro malfrue!

Malfeliĉa dronis jam.

JANUŜ, STOLNIK kaj ZOFJA

Kiu dronis?

JONTEK (malsekigite, spiregante enportas la kadavron de Halka kun malligitaj haroj).

Halka!...

JANUŜ (kun terura krio).

Halka!

(Kuras sur la rokojn apud rivero kaj jetas sin en akvon.)

(Oni vidas en boato sur rivero malvivan Halkon, apud ŝi Jontek donas la manon al Januŝ, kiu el akvo grimpas sur la boaton.)

Bildo. — Kurteno falas.

FINO.



ENHAVO

LAŬ PARTITURO DE « HALKA »

Uverturo simfonia.

AKTO I

	Paĝoj.
N ^o 1. <i>Ĵoro.</i> Polonezo • Longe vivu paro juna •	1
2. <i>Terceto.</i> • Benu patro • (Zofja, Januŝ, Stolnik)	2
3. <i>Recitativo.</i> • Kial ŝi venis • (Januŝ)	5
<i>Kanto.</i> • Kial en horo soleca • (Januŝ)	5
4. <i>Kanto.</i> • Kiel rompita vente arbeto • (Halka)	5
<i>Dueto.</i> • Ho, Janko! karulo! • (Halka, Januŝ)	6
5. <i>Ĵoro.</i> • Kie estas junsinjoro •	8
<i>Ario.</i> • Karaj moŝtoj, sinjoraro • (Stolnik).	9
6. <i>Mazuro</i>	10

AKTO II

Interakta preludo.

N ^o 7. <i>Recitativo.</i> • Jam tie genui mi volus • (Halka)	11
<i>Ario.</i> • Suprenflugi volus mi • (Halka)	12
8. <i>Recitativo.</i> • Kial vi, Jontek, trompis • (Halka, Jontek)	12
9. <i>Ario.</i> • Vi malfeliĉa kredas, knabino • (Jontek)	13
10. <i>Finalo. Dueto.</i> • Enlasu min • (Halka, Jontek).	15
<i>Ĵoro.</i> • Jen kia bru' •	16
<i>Dueto.</i> • Mi vin ja pētis • (Jontek, Januŝ).	16
<i>Sekstelo kun Ĵoro.</i> • Stranga jen knabino •	18

AKTO III

Interakta preludo.

N ^o 11. <i>Ĵoro.</i> • Post vespera servo dia •	20
12. <i>Dancoj de montaranoj</i>	21
13. <i>Ĵoro.</i> • Rigardu • (Halka, Jontek).	21
14. <i>Ĵoro.</i> • Tian ni vidas sinon •	23

AKTO IV

N ^o 15. <i>Recitativo</i> . • <i>Ŝi malfeliĉa, venas</i> • (Jontek)	25
<i>Kanto</i> . • <i>Bruas pinoj sur deklivo</i> • (Jontek).	26
16. <i>Seksteto</i> kun <i>Ĥoro</i> . • <i>Bone, jen amaso kia</i> •	27
17. <i>Duetino</i> . • <i>Kiel ĝoje</i> • (Halka, Jontek).	32
18. <i>Preĝo</i> . • <i>Ĉielpatro, Di-Sinjoro</i> •	32
19. <i>Recitativo</i> . • <i>Ha! idet' malsata nia</i> • (Halka).	33
<i>Kavatino</i> . • <i>Mia ideto!</i> • (Halka)	33
<i>Ĥoro</i> . • <i>Di' potenca, sankta Dio</i> •	33
<i>Kantileno</i> . • <i>Mi vin mortigus</i> • (Halka)	34
20. <i>Finalo</i>	34

WYKAZ

1	1. Wstęp	1
2	2. Wykaz	2
3	3. Wykaz	3
4	4. Wykaz	4
5	5. Wykaz	5
6	6. Wykaz	6
7	7. Wykaz	7
8	8. Wykaz	8
9	9. Wykaz	9
10	10. Wykaz	10
11	11. Wykaz	11
12	12. Wykaz	12
13	13. Wykaz	13
14	14. Wykaz	14
15	15. Wykaz	15
16	16. Wykaz	16
17	17. Wykaz	17
18	18. Wykaz	18
19	19. Wykaz	19
20	20. Wykaz	20
21	21. Wykaz	21
22	22. Wykaz	22
23	23. Wykaz	23
24	24. Wykaz	24
25	25. Wykaz	25
26	26. Wykaz	26
27	27. Wykaz	27
28	28. Wykaz	28
29	29. Wykaz	29
30	30. Wykaz	30

WYKAZ

1	1. Wstęp	1
2	2. Wykaz	2
3	3. Wykaz	3
4	4. Wykaz	4
5	5. Wykaz	5
6	6. Wykaz	6
7	7. Wykaz	7
8	8. Wykaz	8
9	9. Wykaz	9
10	10. Wykaz	10
11	11. Wykaz	11
12	12. Wykaz	12
13	13. Wykaz	13
14	14. Wykaz	14
15	15. Wykaz	15
16	16. Wykaz	16
17	17. Wykaz	17
18	18. Wykaz	18
19	19. Wykaz	19
20	20. Wykaz	20
21	21. Wykaz	21
22	22. Wykaz	22
23	23. Wykaz	23
24	24. Wykaz	24
25	25. Wykaz	25
26	26. Wykaz	26
27	27. Wykaz	27
28	28. Wykaz	28
29	29. Wykaz	29
30	30. Wykaz	30

WYKAZ

1	1. Wstęp	1
2	2. Wykaz	2
3	3. Wykaz	3
4	4. Wykaz	4
5	5. Wykaz	5
6	6. Wykaz	6
7	7. Wykaz	7
8	8. Wykaz	8
9	9. Wykaz	9
10	10. Wykaz	10
11	11. Wykaz	11
12	12. Wykaz	12
13	13. Wykaz	13
14	14. Wykaz	14
15	15. Wykaz	15
16	16. Wykaz	16
17	17. Wykaz	17
18	18. Wykaz	18
19	19. Wykaz	19
20	20. Wykaz	20
21	21. Wykaz	21
22	22. Wykaz	22
23	23. Wykaz	23
24	24. Wykaz	24
25	25. Wykaz	25
26	26. Wykaz	26
27	27. Wykaz	27
28	28. Wykaz	28
29	29. Wykaz	29
30	30. Wykaz	30

WYKAZ

1	1. Wstęp	1
2	2. Wykaz	2
3	3. Wykaz	3
4	4. Wykaz	4
5	5. Wykaz	5
6	6. Wykaz	6
7	7. Wykaz	7
8	8. Wykaz	8
9	9. Wykaz	9
10	10. Wykaz	10
11	11. Wykaz	11
12	12. Wykaz	12
13	13. Wykaz	13
14	14. Wykaz	14
15	15. Wykaz	15
16	16. Wykaz	16
17	17. Wykaz	17
18	18. Wykaz	18
19	19. Wykaz	19
20	20. Wykaz	20
21	21. Wykaz	21
22	22. Wykaz	22
23	23. Wykaz	23
24	24. Wykaz	24
25	25. Wykaz	25
26	26. Wykaz	26
27	27. Wykaz	27
28	28. Wykaz	28
29	29. Wykaz	29
30	30. Wykaz	30

PZE, 3000 egz. wyd. II

Druk: ZSL, ZMP

Książnica Podlaska
im. Ł. Górnickiego w Białymstoku



KP-F14-0000478

ISBN 83-7013-025-9